

Kubo raportas 51 novajn kazojn de Covid-19 kaj du forpasintojn



Havano, sep 19 (RHK) La ministerio de publika sano de Kubo, per la dro. Francisco Durán estro de epidemiologio, informis ke je la fermo de tiu ĉi vendredo, oni konfirmis 51 novajn kazojn pozitivajn kaj du forpasintojn de Covid-19. La totalo akumulita de malsaniĝintoj estas je 5055.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 2001 pacientoj. En tiu ĉi tago oni analizis 7554 samplajn kaj la lando jam akumulas 531 928 studitajn samplajn. Totalo de aktivaj kazoj pozitivaj estas 656 pacientoj.

En Kubo, ĉiis hodiaŭ, el ĉiuj konfirmitaj kazoj 90,2% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum totalo de 439 personoj estis kontaktaĵitaj eksterlande. El la totalo konfirmita 59,4% estis sen simptomaj. El la totalo hodiaŭa 33 estas de Havano, 14 de Matanzas plus Artemisa, Mayabeque kaj Holguin en la oriento. Neniu importita.

La nombro da forpasintoj entute estas je 113 kun indikilo de morteco je 2,24% sub la nivelo de la

amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 20 rilate la mortec-indikilon en la regiono kaj en la pozicio 114 en la mondo. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 4284 jam rekuperiĝintaj (35 pliaj hiera?). Dektri pacientoj estas en grava stato kaj 5 en kriza stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas iom pli ol 30 milionojn da kontagiitoj pro tiu ĉi malsano kun indikilo de morteco je 3,13 % dum la amerika regiono havas ĉirkaŭ 51% el ĉiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 15 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 3,42%.

Kubo trapasas rekuperiĝan fazon, tamen, Havano estas en fazo de loka transmisiado, tial la urbo travivas etapon per limigaj regulaĵoj cele bremsi la kontagion kaj same okazas en la centra provinco Ciego de Ávila.

Oni intensigas la kontrolojn de kontaktoj kaj altigas la nombron da testoj pro la malfavora evoluo dum la lastaj tri semajnoj tra la tuta lando, ankaŭ en provincoj kie ne ekzistas loka transmisio de la viruso.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/234558-kubo-raportas-51-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-du-forpasintojn>



Radio Habana Cuba